

# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro



Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**EKO 2023 / 68. Decembro 1, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.

**Pezo:** Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 360 KB. Sen alkroĉaĵoj de SMG. Sume: KB 400.

## Lingvistoj elektis urbon kun Esperanta aktiveco

La kvinjare okazanta *International Congress of Linguists* okazos en Poznano septembre de 2024, <https://icl2024poznan.pl>, organizata de la Universitato Adam Mickiewicz. Estas bona ebleco kaj prestiĝo organizi kadre de ĝi atelieron pri interlingvistiko, ja ĉi tie interlingvistiko jam havas 25-jaran tradicion.

Ĝoje mi anoncas ke la propono por **Interlingvistika laborsesio** estas akceptita. Vidu la anoncon (workshops): <https://icl2024poznan.pl/?id=2>



Mi esperas ke iuj el vi povos kontribui al la pliriĉigo de la programo. La prelegoj povas esti angle aŭ pole. Verŝajne, ESF povos iom helpi finance. Tio donos eblon al vi viziti la lastan etapon de la nunaj kaj lastaj Interlingvistikaj Studoj kaj semajnfine la kulturalan festivalon Arkones ([arkones.org](http://arkones.org)).

Prof. dr hab. Ilona Koutny, Universitato A. Mickiewicz

La foto (SMG) el 2016 ilustras la multjaran kontribuon de Poznano al la movado.

## Zaozhuang festas sian dekjaran jubileon

Jen artikolo por Ĉina Komunikila Grupo pri la festo por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato.

<https://esperanto.cri.cn/2023/11/24/ARTIAJuDCM8wKHI2VA5LuzrP231124.shtml>

Jen la filmetoj pri la Esperanto-Muzeo:

[https://youtu.be/r1YA1sqhJn0?si=l6qW\\_vFUR8zpyNtx](https://youtu.be/r1YA1sqhJn0?si=l6qW_vFUR8zpyNtx)

kaj la Esperanto-fakultato de Zaozhuang-Universitato:

<https://youtu.be/y-iZ-R2dP2E?si=fNKdWju7nZzhptd6>

Trezoro, Huang Yinbao

## Zhaozhuang arigas gratulojn

Bonvolu transdoni al la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-Universitato miajn sincerajn gratulojn okaze de la 10-jariĝo de la muzeo. Tiu muzeo estas grava ekzemplo de la rolo kiun Esperanto povas kaj povos ludi en la laboro por krei pli pacan kaj pli komunikeman mondon por estontaj generacioj.

Humphrey Tonkin

Mi sendas al vi varmajn gratulojn. Tiu ĉi impresanta atingo estas rezulto de via longdaŭra sindediĉo kaj entuziasmo por la disvastigo de Esperanto en Ĉinio. La Muzeo estas loko por prezenti kaj konservi la historion de Esperanto, kaj funkcias kiel centro por eduki kaj inspiri novajn generaciojn de esperantistoj. Via laboro en organizado de eventoj, prelegoj kaj ekspozicioj estas vera ŝanco por homoj el ĉiuj kulturoj kaj kontinentoj renkontiĝi kaj kompreni unu la alian. Mi esprimas mian admiron pri via persisto kaj energio en la realigo de tiu ĉi projekto. Via sindonema sinteno al Esperanto kaj ĝia rolo en internacia komunikado estas inspira kaj meritas respekton. Mi deziras al vi daŭran sukceson kaj esperas, ke la Esperanto-Muzeo restu loko de internaciaj renkontiĝoj.

Koncizigo de la gratulo de Ahmad Mamduhi, ILEI-prezidanto

## Podkaste el la afrika insulego

Nia ELSENDO N°136 raportos al vi diversajn novaĵojn pri la prezidenta balotado en Malagasio dum la kuranta monato. La podkasto komenciĝas per interesa fabelo malagasa. Alia interesa enhavero temas pri la dua parto de nia artikolo pri Reunianoj en Malagasio dum la kolonia periodo. Ni finas la podkaston per bela kanto de Kajto. Se niaj podkasto plaĉas al vi, ne forgesu donaci iomon por subteni ĝin.

<https://youtu.be/TEzbIVjVpE0>

Henriël FIDILALAO, Madagaskaro

## Avizo pri kvizo

La 25-an de novembro okazis en la Inĝeniera Altlernejo, Centrale en Marseille kvizo. Esperanto-Marseille estis invitita kun kvar aliaj asocioj (SOS-Mediterranée, asocio pri klimato, seksa egaleco kaj ciivitaneco) . Marc Gallardo elpensis la demandojn por la kvizo (pri la lingvoj en la mondo, pri la verkinto de Esperanto kaj kelkaj gramatikaj reguloj). Mi preparis materialon, pensante, ke ĉeestos studentoj-estontaj inĝenieroj, portis librojn, afiŝojn ... kaj evidentiĝis, ke temas pri 15-minuta interveno antaŭ lernejoj de mezgradaj lernejoj en la nordaj kvartaloj de Marseille. Vizitis nin ses klasoj. Fakte la studentoj de Centrale prepariĝis dum la lerneja jaro por helpi tiujn infanojn el malaltaj socitavoloj fari la hejmajn taskojn kaj malfermiĝi al kulturo. La kvizo, sekvita de kuka bufedo, estas ludo por ke ili atente aŭskultu, notu, memoru pri temoj, rilataj al la ĝeneralaj temoj . Mi devis improvizi la intervenon, kaj komencis per du frazoj en Esperanto (ĉu estas itala, portugala, hispana lingvo?). Temas pri la "langue équitable"(kion signifas 'équitable'? *RM: justa*). Sekvis panoramo de la lingvoj en la mondo (prezare al la kvizo), prezento de la verboj (aktiva, kun helpo de Rosy Inaŭdi). Ŝajne la lernantoj estis intersitaj,iuj tre bone respondis, reagis, faris demandojn (eĉ "kie eblas aĉeti libron?").

Sed pli interesa estas la kontakto kun la Asocio de studentoj kaj posta eblo interveni pli longe (du horojn) en la koncernaj klasoj iam dum la lerneja jaro). Dankante pro la organizado mi donacis mian libron *Espéranto Express* al la studentino, kiu zorgis pri nia ateliero.

Renée Triolle (koncizigita)

## Kursa ekskurso

La redaktoro de [edukado.net](https://edukado.net) informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Baza Kurso de Esperanto  
Gvidantonomo kaj aldoninto: Paola Tosato,  
Loko: Padova, Italio.

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27599>

## Mirejo pri Afriko

Prezentaĵo en la kurso B2 konsistis ĉefe el prezento fare de Mirejo Grosjean pri la historio de Afriko, kiu povas interesi ankaŭ la listanojn. Jen la registraĵo:

[https://us02web.zoom.us/rec/share/JI25EN5aJPKNrZUFiG7cYdRHW-c6iM07TTOqzY\\_PbiVW\\_IFs3Jdb6auyYh2Jzhzj.zH7AnGzld1sFJIF2](https://us02web.zoom.us/rec/share/JI25EN5aJPKNrZUFiG7cYdRHW-c6iM07TTOqzY_PbiVW_IFs3Jdb6auyYh2Jzhzj.zH7AnGzld1sFJIF2)

## Mondanoj revenas postpaŭze

La Mondanoj estas Esperanto-rokbando el Berlino, fondita en 1983. Post multaj koncertoj ĉe Esperanto-aranĝoj en Hungario (JER), Pollando, Francio kaj Germanio kaj muzikaj kluboj en Berlino kaj Hamburgo, la grupo havis paŭzon de 36 jaroj. Jen filmo:



<https://youtu.be/uj4a2x8NWEo>

Post la prezento en la Virtuala Kongreso jen ĉi tie revenas La Mondanoj por anonci la aperon de la unuopaĵo 'LA JUNULARO DE HODIAŬ' por la 15-a de decembro

2023 ĉe Vinilkosmo.

## Giesswein memorata en Mosonmagyaróvár, Hungario

La memorata kaj honorata Sándor Giesswein de tiu urbo apud la limo kun Aŭstrio estis festita fine de novembro. Aktive partoprenis esperantistoj, ĉar s-ro Giesswein estis prezidanto de Hungara Esperanto-Societo. Inter la publiko estis Perlo Miela, la prezidantino de HEA, ges-roj Slezak (Tamás kaj Edit), kiuj ja loĝas en tiu urbo kaj s-ro Sabolcs István, kiu povis alparoli la konvenantojn.

Interalie, li diris pri s-ro Giesswein "Li plurfoje parolis pri la temo de Esperanto, inter aliaj, en la Parlamento. Li celebris mesojn en Esperanto. Li instruis Esperanton en la horo antaŭ sia morto. Li efektive estas konsiderata kiel prezidanto-fondinto: de lia prezidanteco oni povas kalkuli la komencon de la unuigita Esperanto-movado en Hungario kaj la komencon de Hungario iĝanta 'Esperanta granda potenco' en la kampo de literaturo. En la antaŭmilitaj jaroj, li estis elektita kiel lingvisto en la Lingva Komitato de la Esperanto-Akademio - li tenis siajn manojn ankaŭ je la evoluo de la lingvo."



Legu en la Esperanta Vikipedio ĉe:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1ndor\\_Giesswein](https://eo.wikipedia.org/wiki/S%C3%A1ndor_Giesswein)

## Premio Grabowski aljuĝita

En la fermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 26-an de novembro 2023, estis anoncita la ĉi-jara Premio Grabowski. La unua (kaj sola) premio (800 usonaj dolaroj) iras al la eldona teamo de *Militrakonto*, nome Javier Alcalde (Hispanio), Pascal Dubourg Glatigny (Francio), Catherine Gousseff (Francio) kaj Ulrich Lins (Germanio). La kvar laŭreatoj ricevas la premion pro siaj elstaraj kontribuoj al la scienca studo de la historio kaj kulturo de la Esperanto-movado kun aparta enfokusigo de la tutmondaj konfliktoj en la 20-a jarcento, temo al kiu ĉiuj el ili kontribuis unuope kaj kune. Aparta kristaliĝo de tiu kolektiva agado estas ĝuste *Militrakonto*, kiu estas ambicia esplorprojekto pri la transnacia imagaro de la dua mondmilito (en plej larĝa senco), vidata tra la vidpunkto de Eo-lingvaj fontoj. En tiu kadro estis iniciatita la retejo [mondmilito.hypotheses.org/](http://mondmilito.hypotheses.org/), kie aperas kontribuaj kaj novaĵoj de la internacia esplorgrupo, kiun gvidas la laŭreatoj.

Koncizigita el Gazetara Komuniko de UEA.

## Konklude pri AMO 105 en Zagrebo

Dum kvar tagoj okazis 15 prelegoj:

- Marija Belošević: Lucija Borčić - vivo kaj verko
- Rubeno Fernandez: Katalogado de esperantaĵoj en publikaj bibliotekoj kun historia alrigardo al CDELI
- Rubeno Fernandez: Katalogado de esperantaĵoj en publikaj arĥivoj en Katalunio
- Mireille Grosjean: Fulmrigardo al la diversaj kolektejoj de esperantaĵoj
- Janez Jug: Esperanto en la biblioteka sistemo COBISS
- Osto Kristan: Biblioteko de Slovena Esperanto-Ligo
- Marija Belošević: Biblioteko de Katolika universitato de Lublin - KUL kaj IKUE
- Krešimir kaj M. Belošević: Eo en la Nacia kaj universitata biblioteko de Zagrebo
- Roland Rotsaert: Esperanto en esperantaj kaj ne-esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj en la flandra (nederlandlingva) parto de Belgio
- Doi Hirokaz: La Esperanto-muzeo en Jokohamo
- Zsófia Kóródy: La Esperanto-sekcio en la publika urba biblioteko en Herzberg am Harz kaj la Biblioteko de Esperanto-Centro Herzberg
- Pascal Dubourg Glatigny: Transiro de asociaj al publikaj bibliotekoj
- Gabriela Skonieczna: Nuna situacio ĉe Nacia Biblioteko en Varsovio
- Bernhard Tuinder: La Eo-muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko

La eventon sume ĉeestis 44 personoj el 22 landoj (Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Bulgario, Burundo, Ĉeĥio, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Japanio, Koreio, Kroatio, Pollando, Reunio, Rusio, Slovenio, Svislando, Ukrainio kaj Usono).

La Memorialon/AMO-seminaron inaŭguris Stefan MacGill kun ĉeesto de la estrarano de UEA Jeremie Sabiyumva. Aliĝis ankaŭ la prezidanto de UEA, Duncan Charters.

===== vortoj: 1360 =====

**La kolekto de EKO por 2023:** <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/> >:.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@e-gmail.com>.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedlistoj.